Wilhelm Müller,

Sur la rivero

tradukita de Manfred Retzlaff

Tre gaje susurinta
River' sovaĝa vi,
Kalmiĝis vi, ne diras
Adiaŭ vi al.mi.

Kovrite per malmola,
Rigida ŝelo en
Sablej' malvarma kuŝas
Vi nun senmove jen.

Enskrapas mi la nomon
De mia karulin',
La tagon kaj la horon
Enskribas mi sur vin:

La tagon, kiam ekvidis
Kaj adiaŭis mi ŝin,
Kaj ĉirkaŭ ambaŭ turnas
Rompita ringo sin.

Traduko de la Germana poemo "Auf dem Flusse" de Wilhelm Müller *(∗1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2007-01-27.*

MR-452-2 / Arg-805-1615 (2013-01-31 21:04:03)

Pri la poeto vidu la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_M%C3%BCller`.